



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 34^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k121/k121.html>

Lí bereco aŭ morto! (Fidel Castro, 1959)



Kuba Ribelucio

N^o 121^a

oktobro 2021

Kajeroj**el la Sudo**

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Enhavo

Redaktore: Kuba Ribelucio.....3

Politiko:

Tiom kostas stulteco de registaro.....4

Paradizoj kaj paradizo.....7

Kulturo:

Nigra legendo, kulturo nigra.....9

Literaturo:

Sanigaj murdoj: Spektaklo.....12

Pri la devo de c. malobeo (fino).....20

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.

Kovrilo: Je 1959 kubanoj ribelis petante liberecon. Sesdek jarojn poste ankoraŭ ili ribelas petante liberecon. Kubo ne ĝuis bonan ŝancon de kiam ĝi ĉesis esti hispana provinco.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.


Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,
kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFTP kaj yafc.





Redaktore

Kubo atingis sian sendependecon je la jaro 1959, elmane de Fidel' Kastro kaj siaj sekvantoj, ĉar la sendependigo helpe de Usono post la Milito kontraŭ Hispanio je 1898 neniam realiĝis. Fakte Kubo, Gŭam', Portoriko kaj Filipinaj Insuloj neniam petis sendependiĝon de Hispanio, sed ili estis alproprigitaj de Usono kiel militajn predojn sen demandi la popolojn, ĉu ili preferas esti usonaj ĉu hispanaj. Sed ili ja perdis statuson, ĉar ili ne plu estis provincoj de la ĉeflando, sed nur kolonioj de metropolo. Kvankam en Kubo tio ne eblis, en Filipinoj kaj en Gŭam' usonanoj malrakidigis la ŝpurojn de tri cent jaroj da hispaneco, kaj nur restas nun kelkaj vortoj en moderna lignvaĝoj de tiuj lokoj. Interese estas rimarki, ke Gŭam' tiutempe estis konata kiel Gaĥam'. Estas hipokrite, laŭ mia eltrovo, ke lando, kies kerna ideo estas *Ni, la popolo*, de tiam prifajfas la deziron de la popoloj de tiuj insuloj. Nun en Portoriko estas movado de homoj, kiu petas reiron en Hispanion kiel Aŭtonoman Komunumon. Ni vidu, ĉu Usono ankoraŭ estas *Ni la popolo*.

Revenante en Kubon, la tiutempe

timatan usonan reinvadon de la insulo nur povis bloki la ekami-keco kun Sovetunio, kaj pro tio Kastro devis submetigi sin kaj la tutan insulon kaj ties popolon al kredo komunisma de tiu dua granda povo tiutempa. Pro tio ne estas surprize, ke la homo, kiu sloganis siajn sekvantojn per la vortoj *Libereco aŭ morto!* serĉis la helpon de la plej malliberiga reĝimo en historio. Jes, Kubo sendependiĝis de Usono, sed kubanoj neniam sendependiĝis de sia registaro. Nur nun ŝajnas, ke malsato kaj malsano puŝis la popolon **ribeli** kontraŭ la **revolucio** kuba, unuvorte dirite **Ribelucio**.

De kiam popola movado komencis kontraŭi la registaron prezidata de Garsia-Kandel', mi perdis la konekton kun miaj geamikoj kubaj, kaj tio zorgigas min, ĉar oni ne plu scias ĉu ili malbonfartas pro politikaj kialoj. Ĉu homoj ne plu havas rajtojn, eĉ la maldensan rajtaron, kiujn ili ĝuis ĝis nun en la insulo iama hispana?

Sed eble ni hispanoj devus lerni ion de niaj samideanoj kubaj kaj peti liberecon, ĉar ni daŭre havas deputitojn kaj registaron, kiuj ne reprezentas nin kaj ne laboras por nia profito, sed por tiu sia.

Tiom kostas stulteco de registaro

Plej eble leganto surpriziĝas legi tiun titolon. Sed oni povas miri pri la stultaĵoj, kiujn diversaj registaroj de Hispanio jam faris laŭ nia historio.

Mi memoras, ankoraŭ studante mi ĉe universitato, ke profesorino pri Historio de Usono rakontis al ni, ke laŭ la historio de tiu lando, *ĉiam venis providenca politikisto, kiu bone faris por la bonfarto de ties civitanoj*. Senrigarde al tiu usonemo de mia profesorino, mi rigardas la historion de Hispanio, kaj konkludas, ke




tiu ne estis la kazo de nia lando de post Isabel' *la Katolikulino*. Nun malsanuloj pri estantismo



eble konsideras ŝin rasisma kaj kulpa pri multe da pekaj de tiu perversa religio nova, Politika Korekteco, sed precize ĉar ŝi uzis religion katolikan por unuecigi la tutan landon, ŝi faris bonan politikon por la bonfarto de siaj subuloj. Ŝi diktis leĝojn por ke oni respektu indianojn, ke oni ne perforte konvertu ilin en katolikojn, male al tio, kion ignorantoj hodiaŭaj asertas sen scii pri tio, kion ili diras, nur pro tio, ke ili estas mezvaloraj kaj deziras, ke elstaruloj de istempo estos rigardataj desupre.

Mi parolos aliloke pri la nuna registaro de Hispanio, sed ni vidos, ke la afero venas el foraj tempoj. Kiam nia lando havis imperion disde la tuta mondo, Napoleon' invadis ĝin, kaj dum tiu ĉi katastrofo la supozata alianculo, Britio, organizis la ribe-

lon de la supozataj kolonioj —fakte ili estis **provincoj** de Hispanio, organizitaj kiel vic-regnoj— kontraŭ la *patrina patrio*, kiu finis kun enpoŝigo de multe da oro amerika en Brition, kaj ankaŭ ŝuldoj, kiuj en la kazo de Peruo finis pagiĝi en la 20^a jarcento. Post la sendependiĝo de Nova Hispanio (Meksikio) Usono profitis la ŝancon por militi kontraŭ la potenco, kiu helpis ilin sendependiĝi de Britio unu jarcenton antaŭe, je 1898, konkludante per la forrabo de Kubo kaj Filipinoj, en kiuj ili propagandis daŭre kontraŭ la lando, kiu donis al tiuj landoj sian kulturon, lingvon kaj religion, provizante tricentjaran pacon, kiu finis tuj post ties *sendependiĝo*. Simon' Bolivar mem



Juna Simón' Bolivar, antaŭ li iĝis la perfidinto de Ameriko kaj Hispanio.

konfesis, kekajn jarojn poste, ke ili *atingis sendependecon koste*

al ĉio alia. Tio ne ŝajnas tre inteligenta. En Kolombio li ordonis mortigi tribojn de indianoj pastunaj, kiuj dum tri jarcentoj pace vivis sub la regado de Hispanio. Estas maldece, ke nun civitanoj de tiuj landoj, Kolombio kaj Venezuelo, akuzas Hispanion pri genocido, kiu ne okazis ĝis kiam liberiguloj Bolivar kaj San Martín aperis.

Sed ne sole en Ameriko estis stultaj registroj. En la 19 jarcento estis ŝoka invento de hispano Izaak' Peral': **submarŝipo**. Ĉu la registaro tiutempa profitis la ŝancon gajni la plej grandan povon en la mondo kaj reakiri la respekton kaj influon en la tutan mondon, kiun Hispanio iam havis? La registaro prezidata de Práxedes Sagasta malapogis la projekton, sed la interveno de la reĝino regenta María Cristina ordonis produkti prototipon, kaj ĝi ĉesis esti teoria afero, kaj je 1888 la unua submarŝipo navigis sukcese unuafoje en Kadiz'. Sed postaj ministroj Jozefo María Beranger kaj Rafael' Rodríguez Arias ne nur ne apogis la fabrikadon kaj disvolvo de la invento, sed apogis kampanjon fifamigan al la inventinto, kiu devis forlasi la mararmeon kaj klarigi antaŭ publika opinio la veron pri sia invento.

Vidate de pli ol jarcento poste, kaj konante pri kiaj hispanaj

politikistoj nunaj, oni ne povas ne pensi, ke la tiutempaj ties kolegoj ne estis tre malsamaj, kaj sekve, estas facile pensi pri

nura submarino. Tio signifas, ke kontraŭ la prezo de unu militŝipo, Hispanio povintus havi tutan floton da submarŝipoj, kaj


Submarŝipo Peral, la armilo kiu venkintus Usonon kaj Brition.



sekve ĝi venkintus la Militon de Kubo, tiel ne perdante la insulojn Kubon, Filipinojn, Porto-

la neniam pruvita afero, ke la britoj subaĉetis la ministrojn hispanajn por ke ili bloku la fabrikadon de submarino, ĉar se Hispanio havintus ĝin, Gibraltar' venus facile denove sub la hispana suverenecon, se ĉiu militŝipo brita sur tiu loko estus subakvigata. Oni neniam pruvis tion, sed laŭ mi ĝi estas las sola kialo por ke Hispanio renoncis la plej povan kaj tamen malmultekostan armilon en sia

rikon kaj Gŭamon, kiuj nun povus esti aŭtonomaj komunumoj de Hispanio... Aldone, la frustrigo perdi tiun militon neniam venus, kaj ankaŭ Hispanio pli ol eble ne irintus en la marokan aventuron kune kun Francio, kaj poste ankaŭ neniam okazintus la kondiĉoj, kiuj gvidis la landon en la Intercivitan Militon. Sed tion malebligis la stulteco aŭ monavideco de la tiutempa hispana registaro.



Izaak' Peral, inventinto de submarino.

Revenante en Kubon, ankaŭ mankus la kialojn por revolucio fidelkastra, kaj la venomo komunisma neniam okupiĝus Sudamerikon.

Estas ironie, kiom da gravaj sekvoj okazintus simpla determineco kaj amo al patrio, kiujn siatempe nur Izaak' Peral' havis, Pro tio Kubo estas komunisma hodiaŭ. Tio okazas nun kaj en Kubo kaj en Hispanio, ke la registaroj havas popolon kaj homojn, kiujn ili nek meritas nek konas.

tuta historio: militŝipo tipa, krozŝipo, kostis 25oble da unu-

Paradizoj kaj paradizo

Ŝajnas ĝenerala pensregulo por maldekstruloj, ke en la mondo tiu, kiu ne estas riĉa, estas malriĉa. Ĉu perfida subkonscio? Sed ĉiukaze, kiam oni



scias iom pri historio, oni trovas, ke sub la caroj homoj vivis pli bone ol sub Sovetunio. Sub la regado de la caroj, multe malpli da homoj estis mortopafataj ol sub la feliĉe formortinta Unio de Sovetoj, kiuj fakte ne ekzistis, ĉar la estro estis Totalisma Diktatoro, unue Lenin', poste Stalin', poste Hrušov', poste Breŝnjev, ĝis kiam aperis la plej honesta diktatoro (alidirite *Sekretario de la partio PKUS*), Mihajl' Gorbaĉov, kiu havis la deon likvidi tiun fian reĝimon, la plej sangavidan, kiun la homaro suferis en sia tuta historio, psikopatan reĝimon, kiu murdis kaj torturis *por la bono de la kaŭzo* kaj tial sen pento aŭ celo de la amendo ia, ĉar *viktimoj ĉiam kulpas*. Oni nur devas legi la verkon *La Gulaga Insularo* de Alexander Solzhenitsyn, Nobelpremiito pri Literatu-

ro je 1970, por ekscii, kio kuŝas malantaŭ la falsa kaj hipokrita propagando, kiun maldekstro ĉiam faris. Temas pri la plej senkoraj mizeruloj —malriĉaj— atingas potencon kaj konservas ĝin tiom longe kiom ili povas, sendepende de kiom da homoj devas esti murditaj, rabitaj aŭ iliaj vivoj ruinitaj. Tial ĉiuj, kiuj povas, foriras de tiuj ko-

munismaj paradizoj, kiuj ekzistas nur en la malsana pensmaniero de siaj propagandistoj.

La kapitalisma mondo ne estas ideala, ĝi ne promesas paradizojn sur la tero, kaj ĝi vivas koste de tiuj, kiuj ne havas monon, vere, sed ĝi ne perfortegas ilin ĝis rabado de vivo kaj trankvilo, sed ĝi ankaŭ konsideras ilin konsumantoj kaj tial lasas ilin minimumo por konsumi. En Sovetunio la minimuma prezo de aferoj estis fiksita, kaj tial multaj aferoj ne estis trovataj. La registaro devis konstrui ilin, kaj tial ni havas la aŭton Trabant, ekzemple, vera muzea peco hodiaŭ, tre multekosta kaj tre malbona maŝino, ke tuj kiam la Muro falis, ĝi devis ĉesi produktiĝi, ĉar la Ford Fiesta superis ĝin per kvalito por la sama prezo kaj sen devi vici dum jaroj. Kaj tio estas nur unu ekzemplo.

Sed la okcidenta mondo, fidela al siaj antaŭjuĝoj kaj kompleksoj, daŭre voĉdonas al maldekstraj partioj, ĉar ĝi ne lernas lecionojn. Jam en la 1930-aj jaroj en Germanio estis voĉdonita maldekstra partio, la nacisocialisma, kiu promesis al ili ĉion bonan, sed tio, kion ĝi faris anstataŭ tio estis konduki la tutan mondon al katastrofo. Tiam la maldekstruloj sisteme mensogis ĝis la punkto, ke nuntempe ne malmultaj konsideras, ke tiu partio estis dekstra. Alivorte, oni estas ĉu komunisto ĉu naziisto (sinonimo de ekstremdekstrulo!) Sed la realo estas pli obstina, kaj eĉ la malpli inteligenta leganto —se libera de la venena komunisma propagando, gloranta murdon kaj rabadon— povas kompreni, ke dekstre de ambaŭ estas multe pli alloga arko, kiu iras de la socia demokratio al dekstro plej sovaĝa, tiu, kiu valoras monon super ĉio alia.

Tamen, super tiu malbonvola arko —kiu inkluzivas la maldekstran— ni havas reprezentecon kaj disigon de povoj, tio estas, Demokratio, tiu granda forestanta el la historio de Hispanio. Liaj du pli aĝaj fratinoj, Libereco kaj Justeco, plenkreskaj en la tempo de Karlo la 1^a de Hispanio, kiam la imperiestro ĉesis la konkeron de Ameriko, nurafoje en nia historio, por peti **komitaton de spertuloj** —kiu ja ekzistis kaj havis publikajn debatojn— en kiu monaĥo nomata Hines' de Sepúlveda renversis la opiniojn de iu Bartolomé de las Casas, dominiko kaj perfidulo al sia nacio, pruvante, ke estas laŭleĝe kaj etike civilizaci kaj kristanigi la indianojn de Ameriko, kiujn per la religio de la konkerintoj oni lernigis manĝi Dion anstataŭ esti manĝitaj de Li en la ventrojn de la meksikaj pastroj kaj ties amikoj.

Domage, ke hodiaŭ Libereco kaj Justeco ferias for de Hispanio ... Kaj en tio, la socialisma funkciado de la voĉdono de la malkleraj homoj de ĉi tiu lando havis multon por fari, kio malgraŭ esti multaj, tamen estas pensoturpaj. Jes mi rajtu mi parafrazi pastron Fejhoon, kies ducentjariĝa reĝa frazo povas levi pli da malkontento aŭ malkomforto: *La malsaĝuloj, kvankam multaj, restas malsaĝaj.* Mi ne dirus tiom multe: la honesta voĉdonanto de socialismo aŭ komunismo **ne estas stulta**, sed simple **malklera**. Ĉar se oni scius historion, se oni turnus sin al historiistoj anstataŭ al politikaj propagandistoj de sia partio por ekscii pri tio, kio okazis antaŭ ol oni naskiĝis, oni scius, ke neniu murdis tiom multe aŭ same sendistinge kiel la Komunista Partio de Sovetunio. Dekstrulaj reĝimoj murdis, vere, sed ĉiam kun kriterioj, kiuj povas aŭ ne esti aprobatataj. Aliflanke, tiuj maldekstraj murdis tutajn sociajn tavolojn, ĉar ili estas genocidaj de naskiĝo. Ni konsultu historion.

Tial ni devas vekigi. Se ni volas, ke Hispanio estu respektata denove, ni ĉesu esti timemaĉaj, kaj ni ĉesu voĉdoni por la partio, kiu plej malriĉigis nian landon en sia tuta historio.



Kulturo

Nigra legendo, kulturo nigra

Mi memoras, ke iam anglo diris al mi en Skotlando, ke la *Armada Hispana* (mararmeo) provis ataki Anglujon, sed ĝi estis facile venkata, kaj tiel *hispanoj lernis ne ĝeni Anglujon denove*.

Certe mi sciis pri tiu atako, kiun oni komentis en mia historia klaso kiam mi estis knabo, kiel granda invado fare de la reĝo Filipo 2^a de Hispanio, kaj ke pro la malsukceso, li nur komentis, ke li *sendis ĝin kontraŭ homoj, ne kontraŭ atmosferaj elementoj*.

Mi komentas ambaŭ versiojn kiel ekzemplon de fuŝa historia instruado en ambaŭ landoj. Mi ne multe pli konis pri la afero, sed kiel hispano, mi devintus koni pli bone, multe pli bone. Sed tamen, de neangla vidpunto, demando venis tiam en mian kapon: se oni atakas min malsukcese, estar nur logike, ke mi kontraŭataku la atakanton, ĉu ne? Kaj ne nur malebligi la atakon, sed vundi lin plej eble kiel dure. Sekve, mi demandis al tiu fiero anglo: *Do kial Anglio ne atakis Hispanion post tiu atako? Ĉu Anglujo invadis Hispanion poste?* Mi memoras, ke li nur levis siajn ŝultrojn, dirante, ke li scias nenion pri tio.

Eble li pravis, sed li kaj mi, ambaŭ malprave ne sciis pri la afero. Preskaŭ kvindek jarojn poste mi lernis la tutan veron pri la afero: ja estis reago al tiu atako. Elizabeto 1^a de Anglio je 1589 —nur unu jaron post la katastrofo de *La Armada*— ja sendis kontraŭmararmeon (*La Contraarmada*) kun pli ol 180 ŝipoj, kiu atakis La Korunjon, Lisbonon —tiam parton de Hispanio— kaj poste Azorajn Insulojn (por malebligi ŝiptrafikon al Nova Kontinento) sensukcese, perdante pli ol 20000 homojn en tiuj tri malvenkoj. La angla mararmeo revenis en Anglion kun honto kaj sen honoro, kiel decas al entrepreno mendata al pirato, Francis Drake (Francisko Drakon'). Tiuj angloj, kiuj fiere parolas pri *La Armada* honte silentas aŭ maldiskonigas pri *La Kontraŭarmada*.



Italoj jam komencis la Nigran Legendon kontraŭ Hispanio, eble pro tio, ke ili rigardis nian landon kiel provincon de la Romia Imperio, kies herendintoj ja italoj diras, ke ili estas, kaj sekve la entrepreno amerika apratenas al ĉefurbo imperia, kaj *ne al putra provinco...* Sed Romio ne plu ekzistis, kaj fakte Italio ankoraŭ ne, kiel sendependa lando. Do la romianoj de *Hispania* prenis sian civilizacion en novan kontinenton, kies plej grandan parton —Nunan Meksikion— ili nomis preskaŭ kiel sin: **Nova Hispanio**.

Per la tiutempa nova invento, presilo, protestantoj en Anglio, Germanio kaj Nederlando diskonigis mensogojn pri la hispana konkero de Ameriko,

ĉar ili enviis la bonŝancon de hispanoj kaj portugaloj esti komisiitaj de la Papo por disvastigi kristanisman inter sovaĝaj homoj de landoj malkovreblaj, kiujn ili celis dividi kaj malamikigi. Sekve, hispanoj ĉiam konsideris indianojn personoj kun plenaj rajtoj, kio estis oficiale certigita de la Katolikaj Reĝoj Isabel' kaj Fernando per diversaj leĝoj, kaj eĉ per sia testamento, la reĝino deklaris, ke ŝia volo estas, ke indianoj estu respektataj kaj protektataj. Kaj ili tion faris plejparte de la historio de hispana Ameriko. Nur post la traktato de Utrech, je 1714, oni devigis permeson pri komerco de nigraj sklavoj en la hispanamerika lando, kio estis ĝis tiam malpermesita, konforme al la lasta volo de Reĝino Isabel *La Katolikistino*.



Kruela kaj ruza raso la anglo estis, ĉar dum ili observis protektantan leĝoj por sia industrio ĉe Anglujo, ili penis devigi liberan komercon aliloke. Tio eble estas alia kialo por la fifamigo de la hispana laborado en Ameriko. La mensogaro pri tio fare de nederlandanoj, angloj, italoj, germanoj kaj eĉ portugaloj, tamen ne ĝenis la konkeron, kaj Hernán Cortés konkeris la tutan teritorion de Mezameriko ĝis Kanado, escepte de la 13 kolonioj, kiuj la angloj jam havis sur la kontinento. Pro tio malagano Bernardo de Gálvez povis venki la anglan armeon je kelkaj bataloj, inter kiuj la plej fama estis tiu de Pensacola je 1781. Tiu fakto estis forgesita unu jarcenton poste, kiam per alia milito Usono forrabis la kvar lastajn

provincojn hispanaj pretermarajn, Kubo, Portoriko, Gŭam' kaj Filipinoj, igante ilin kolonioj... De tiam Usono ankaŭ akordigis sin kun la kalumniaj potencoj en la historio de Hispanio, kiuj ankoraŭ subtenas la Nigran Legendon.

Sed se oni pensas iomete, kaj ĉefe se oni komparas la agadon de Hispanio kaj tiujn de Anglio, Nederlando, Germanio, Belgio, Nederlando, eĉ de Portugalio, kun ciferoj kaj faktoj, oni ne povas ne pensi, ke **tiuj landoj ne bezonis Nigran Legendon**: ties historioj veraj jam provizas al ili per sufiĉe da fienco: Aŭstralio enhavis 900 000 indiĝenoj kiam la britoj ekiris tien, kaj nun estas nur 30 000 pli-malpli, same kiel en Usono, kie loĝis kelkaj milionoj antaŭ la alveno de la britoj. Dum jarcentoj jam estis tie hispanoj ĉe meza kaj okcidenta partoj de Usono, de sudo al nordo, kaj neniam estis buĉado da indianoj. Kelkaj, kiel Gerónimo apaĉa, estis kristanoj kaj parolis la hispanan. Sed unue britoj, kaj poste usonanoj forpuŝis indianojn okcidenten, kaj finfine en rezervujojn, kie tiuj ĉi malsatis kaj mortis amase. Oni emas pensi, ke Abraham' Linkoln' estis bonulo, sed junaĝe li estis kapitano de la usona armeo, kaj ankaŭ li mortigis kaj fermigis indianojn en rezervujojn. Kaj prezidento li ankaŭ ne plenumis la vorton de *homo blanka* kaj perfidis la ekzistantajn paktojn kun indianojn.

Tiujn faktojn kaj multajn aliajn oni povas legi en la verko de Marcelo Gullo Omodeo kies kovrilpaĝo estas je la komenco de ĉiu tiu artikolo, titolita *Madre Patria* (Patrino patria). Temas pri pruvoj de falseco de la asertoj de la **Legendo Nigra** kontraŭhispana de ties komenco ĝis nun. Per klara uzo de la lingvo kaj plenpleno da citaĵoj, la aŭtoro enirigas nin en la aferojn hispanajn de la istempo rilate al Konkero kaj aliaj aferoj. Mi ege rekomendas la legadon de tiu interesa libro por havi klaran ideon pri tio, kial Hispanio havis kvarjarcentaĝan imperion, dum tiu de Britio daŭris nur 50 jarojn. Oni povas argumenti, ke la racio de forto povas pli ol forto de racio, sed la longdaŭreco de la Hispana Imperio sur la mallongeco de la daŭro de la Brita Imperiismo pravas male al tio.



Sanigaj murdoj

7 Spektaklo komencas

Mi vidis Brendinon denove ĉe la proceso. La advokato de Tomas' estis vere limigita kaj fuŝa, kiu ne povis eviti, ke lia kliento estis kondamnita per cirkonstancaj kaj neniel decidaj pruvoj. Oni vidas, ke estis rapidado fini proceson, kiu profitigis neniun kaj ke ĉiuj timis, ke ĝi levus multe de bruo kiu malkovros ion maloportunan. Mi sciis, kiom da honorindaj homoj kaŝis sin inter la moknomoj de la klientoj kaj amikoj de Silvin'. Inter ili estis la juĝisto, kiu juĝis la faktojn, kaj ankaŭ tiuj, kiujn li citis. Poste, kiam la proceso estis historio, mi sendis formalan leteron al ĉiuj, kaj multaj venis al la rendevuo. Sed mi rakontos pri tio poste.

Mi renkontis multajn persone plej sensuspekteme: ĉe festo. La artikoloj de Silvin' inkluzivis noton: Festo ĉe El Antro vendrede la 23an. Restis ankoraŭ unu monato, ĉar hodiaŭ estas la 25an, do mi ellaboris planon. Inter unu afero kaj alia, mi revenis al la laboro, malgraŭ kiu mi daŭrigis per mia aliro disigi la lolon de la trifiko. Mia unua paŝo estis aĉeti maskon kaj alkitimiĝi al ĝi. Ĝi estis el ledo kaj kovris ĉion krom miaj okuloj.

La loko estis vasta kaj havis serion de budoj, kien homoj iris kun siaj amikoj kaj havaĵoj, kiel mi malkovris parolante kun iuj el ili. Mi vidis, ke mi ne estis la sola portante maskon, kio ĝenis mian esplordon. Tiom da homoj devis kaŝi sin? Kaj tamen tion mi faris ...

«Saluton, sinjoro», diris al mi vage konata voĉo.

Mi turnis min kaj vidis tiun brunharan knabinon, de kiu mi fuĝis antaŭ iom da tempo, en alia

loko simila al ĉi tiu.



«Saluton. Ĉu mi konas vin?»

«Jes. Ĉe alia festo ni havis kontakton. Ci donis al mi paron da karesoj».

La vangofrapon, mi diris al mi.

«Ho jes. Ĉu mi donis al ci malmultajn?»

Ŝi ridetis, ĝoje, ke ŝi malkovris min.

«Mi ne certis, ĉu temas pri ci. Ne havis ci maskon lastan fojon».

«Certe. Vere estas, ke mi ne scias, kial mi surmetis ĝin».

«Estas gravaj homoj, kiuj ne volas, ke oni sciu, ke ili venas ĉi tien, sed ci ne estas unu el tiuj».

«Ho, ĉu ne?» Ŝi ridetigis min, kvankam la masko ne lasis ŝin vidi tion. «Kiel ci scias tion?»

«Ĉar ĝi evidentiĝas, Cetere ci estas bona homo».

Bona homo. Ĉi tiu knabino estis de la Spionservo...

Ŝiaj haroj longiĝis, nun ĝis la ŝultroj. Mi estas multe pli malfacila homo nun ol kiam mi laste yidis ŝin, kaj nun mi havas mision. Ĝi ne plu estis simpla replenigo de kaduka supermerkato en duonlaboreco. Nun mi estas viro kun misio en la vivo, pro kiu mi devas transdoni mian komforton, mian personan bonfarton kaj eĉ mian konsciencon, kvankam ĝi kulpigas min pri nenio malgraŭ ke mi jam ŝargis du murdojn sur ĝin.

Mi ridetis al ŝi, kaj lasis ŝin paroli, por ke ŝi povos implikiĝi plie:

«Kaj ci estas...»

«Sendin'. Kaj ci? La alian fojon ci ne diris al mi vian nomon aŭ vian kromnomon».

«Marko, mi estas Marko, Sendin'." Ĉu ci ankoraŭ ne havas prizorganton?»

«Mi ĵus trovis ĝin».

«Ha, gratulon. Kaj kiu estas la feliĉulo?»

«Ci».

«Ĉu mi?»

«Ĉu ci ne volas?»

«Ci unue demandu min, ĉu ne?»

Kio okazis tiam estis kafkeska. Tiu

knabino demetis la nigran puloveron, kiun ŝi havis kiel tutan vestaĵon, kaj portante nur paron da stilaj ŝuoj, ŝi genuis antaŭ mi kun la kapo sur la planko kaj diris tiom laŭte por ke ĉiuj aŭdu:

«Mastro Marko, prenu min. Akceptu la sindonon de ĉi tiu knabino, por ke ŝi estu feliĉa!»

Ili ĉiuj fikse rigardadis min, iuj scivolemaj, aliaj mokemaj, kaj estis eĉ iom da misplezuro.

Mi ĉirkaŭrigardis, ne sciante kion fari. Sed mi superis ĝin. Mi jam paŝis super dominulino kaj ŝia subulino, do paŝi super ĉi tiun knabinon kaprican, kiu ne scias, kion ŝi faras, estus multe pli facile. Mi tiris liajn harojn por igi ŝin rigardi min, kaj mi diris:

«Konsentas mi, sklavino».

Mia unua ordono estis signali ŝin, per mallonga sed preciza gesto, ke ŝi ekstaru. Mi kondukis ŝin al la sama budo kiel la alian fojon, sed anstataŭ frapi ŝin, kiel tiam, mi igis ŝin sidi antaŭ mi, ankoraŭ nuda, por esti submetita al ĝisfunda pridemandado.

«Diru al mi, Sendin': ĉu ci neniam estis kun iu?»

«Jes, mastro». Tiu afero pri mastro malplaĉis al mi, sed mi supozis, ke ĝi estas la kutimo.

«Klarigu al mi».

«Ĉe ĉiu festo mastro akceptas min. Tiam ĉiu iras hejmen kaj la rilato finiĝas».

«AHA. Ci estas diboĉa».

«Iom».

«Ĉu iu el tiuj mastroj amoris kun ci?»

«Ne, mastro. Preskaŭ ĉiuj fikis min, sed ili neniam amoris kun mi».

Tiu knabino pensis. Mi ne fartis bone tiun nokton. Mi fakte decidantas, kiel mi finos ŝin tiun vesperon, kaj per tiu frazo ŝi ĵus senarmigis min. Tial mi diris al ŝi, preskaŭ aŭtomate, por aĉeti tempon kaj pripensi:

«Prenu al ni du bierojn».

«Mastro, mi ne havas monon», ŝi diris, metante siajn manojn sur siajn neekzistantajn poŝojn en sia neekzistanta kostumo, ĉar ŝi ankoraŭ estas nuda.

Mi ĵetis al ŝi ŝian puloveron, kiun mi prenis de la planko antaŭ veni en la budon, kaj donis al ŝi dudek dirante: «Surmetu tion, subulino. De nun via nudeco estas nur por mi».

Post kelkaj minutoj ni ambaŭ bierumis kiel du bonaj amikoj. Ŝi ankoraŭ estis antaŭ mi vestita per tiu longa pulovero, kiu malsupreniris al mezo de ŝiaj femuroj.

«Diru al mi, Sendin': kia estas via metio?»

«Mi estas policanino».

«Ĉu urba?»

«Ne, nacia».

«Interese. Ĉu ci laboras tiel delonge?»

«Ne. Du jarojn».

«Du jarojn... Kiom jaraĝas ci?»

«Dudek kvar».

Dudek kvar... Tiom dolĉa belulino. Kial neniu konservis ŝin?

Ĉu ŝi estis tiel konflikta? Sed certe ŝi ne estas tiel malbona kiel la mastro, al kiu ŝi ĵus submetiĝis...

«Mi devas konfesi, ke mi malmulte komprenas pri ĉi tio».

«Eble, sed ci lerte frapas».

«AHA. Ci ankoraŭ memoras. Ĉu ci certas, ke ĝi estis mi?»

«Jes. Tiu masko ne trompas min. Ci foriris, timigita».

«Ne. Temis pri malŝato».

«Mastro, ci povas ripeti ĝin kiam ajn ci volas», ŝi diris, genuante antaŭ mi.

«Senvestiĝu», mi diris, ignorante ŝin.

Ŝi obeis tuj. Per unu sola manmovo, ŝi forĵetis la puloveron kaj staris antaŭ mi, atendente miajn ordonojn.

"Ĉu ci komfortas nude antaŭ mi?"

«Kompreneble: ci estas mia mastro».

«Kio estas via mastro?»

«Mia posedanto».

«Ĉu por ĉiam?»

«Ĝis ci volos».

«Mi pensis, ke vi subulinoj vidiras viajn mastrojn».

«Nur se vi volas. Mi parolos al vi, kiel vi diros al mi».

«Ne. Bone: rakontu al mi pri ci mem. Ĝi estas amuza».

«Kiel vi ordonas, mastro».

«Ĉu ci konas la homojn tie

ekstere?»

«Preskaŭ ĉiujn». Mi ŝatis tion, ĉar ĝi malfermis interesan aspekton, kaj mi ĵus donis plilongigon al mia aparta perversulino.

«Ĉu vi konas Roĝeron?» Tio estis unu el la kontaktoj de Silvin'.

«Jes, mastro, kompreneble jes. Li estas la mastro de Roŭin', unu el miaj plej bonaj amikinoj».

«Ĉu li estas ĉi tie hodiaŭ vespere?»

«Li eble venos poste, sed li ankoraŭ ne venis».

«Kiu estas Roŭin'?»

«Ŝi estas mia plej bona amikino. Ni ekkonis unu la alian en infanĝardeno. Poste ni apartigis fininte mezlernejon, ĉar ŝi iris al universitato, kaj mi iris al laboro».

«Ha, tio kutime kaŭzas perdo da geamikoj».

«Sed ni daŭre vidas unu la alian, mastro. Nu, ĝis ŝi edziniĝis. Ŝia edzo praktike forrabis ŝin. Stultulo. Ili ĵus metis lin en malliberejon».

«Kiel estis tio?»

«Jes. Ŝajne li donis al ŝi kornan atakon kaj mortigis ŝian mastrinon».

«Kio!?» Mi diris, resaltante. Mia koro donis strangan flirtadon, sed mi ne atentis, ĉar sinistra pordo ĵus malfermiĝis, kiun mi malfacile trauros.

«Jes, li ja mortigis sian mastrinon».

«Ĉu li estis edziĝinta al Roŭin' kaj li aldone havis amantinon?»

«Jes. Mi eksciis, kiam mi vidis ĝin en la ĵurnalo».

«Ĉu via amikino nomiĝas Brendin'?»

«Mastro, ni ne uzas niajn verajn nomojn, eĉ ne inter konatoj; sed jes, ŝi nomiĝas tiel. Ĉu vi konas ŝin?»

«Ni diru, ke reciproka amiko prezentis nin unufoje. Sed ne diru al iu ajn, ke mi konas ŝin. Eĉ ne al ŝi».

«Ne, mastro. Dum mi estos via, neniuj scios viajn sekretojn per mi».

Mi sentis, ke tio estas minaco, sed mi lasis ĝin pasi. Mi ne kredis tiutempe, ke ŝi tiam minacis min aŭ tiam. Ŝi konvinkos min poste, ke ne ekzistas malgranda malamiko, nek oni povas esti certa pri io.

«Diru al mi, Sendin': kial vi ne havis konstantan mastron?»

«Mi ne scias, mastro. Viroj eble timas min».

«Venu, donu al mi vian telefonnumeron», mi diris, ridetante kaj donante al ŝi malgrandan paperan taglibron kaj plumon. Ŝi skribis la naŭ ciferojn klare kaj rapide kaj poste aldonis la vorton Sendin'.

«Por kio vi volas mian telefonon, mastro?»

«Por regi vin, Sendin'. Nun, kiam vi estas mia, mi scios ĉiam, kie vi estas kaj kion vi faras».

Ŝi ridetis, eble ŝi ne esperis tion.

«Ĉu ci loĝas sola?», mi ade demandis.

«Kun mia patrino».

«Nu, ĉar vi ne havas partneron,

mi telefonos al vi ajnan tagon aŭ nokton».

«Jes, mastro».

«Turnu».

Ŝi obeis kaj mi sidvangofrapis ŝin duoble tiom forte kiom mi povis. Ŝi estis forta kaj dura knabino, ĉar ŝi ne moviĝis. Liaj gluteoj estis rigidaj, kvazaŭ ili estus el granito. Tiu knabino faris pli da gimnastiko ol ŝi aspektis. Post ĉiu frapo ŝi diris: Dankon, mastro.

«Nun revestiĝu kaj sidu ĉi tie apud mi».

Tuj farinte ŝi, mi ĉirkaŭbrakis ŝiajn ŝultrojn kaj kisis ŝin entuziasme. Tiam mi rigardis ŝin dum ŝi ridetis al mi.

«Ĝis mi volos...»

«Jes, mastro».

«Ni vidos, ĉu vi eltenas».

«Mi esperas, majstro».

«Via unua testo estos gajni mian fidon».

«Jes, mastro».
